

Jacopone da Todi:

LA PLORO DE LA MADONO

Enkonduko

Jacopone el Todi (centr-itala urbeto ne malproksima de Asizo), vivinta en plena Mezepoko – li naskiĝis inter 1230 kaj 1236, mortis en 1306, do li estis proksimume samtempulo de Dante Alighieri (1265-1321) kaj Giotto di Bondone (1266-1337) kaj tuj posteulo de Francisko el Asizo (1182-1226) – estis, komence, edziĝinta notario.

Lia vivo abrupte ŝanĝiĝis, kiam, dum dancofestoj, la planko de la ĉambro disfalis, kaj lia edzino mortis. Tiam li fariĝis laika franciskano laŭ plej rigora regulo, kaj tiom multe batalis kontraŭ la misvojiĝoj de la pli mildaj branĉoj de la franciskana ordeno, ke li estis enkarcerigita fare de la tiama Papo Bonifaco la 8a (la sama, kontraŭ kiu batalis Dante, kaj kiu proklamis la unuan Jubileon en 1300).

Pro humileco, li ankaŭ ŝanĝis sian nomon, de Jacopo (Jakobo) al Jacopone (en ĉi tiu kazo en pejorativa senco, do Jakobaĉo).

En posta tempo li estis deklarita beatulo, kaj lia festotago falas la 25an de marto, la tagon de lia morto, ĉar laŭ la katolika eklezio la vera naskiĝtago (tiu al la ĉielo) estas la tago de la korpa morto.

En 2016, pro nekutima koincido, la 25a de marto estis Sankta Vendredo; tute taŭga okazo por memorigi lin duoble, ĉar lia plej konata poezia verko estas ĝuste dramigita laŭdokanto, kvazaŭ teatraĵo (ĝi estis ludata sur la placoj), pri la krucumo de Jesuo. Ĝi ne havas titolon en la originalo, sed estas kutime citata kiel «Il Pianto della

Madonna» (La ploro de la Madono). Aliaj titoloj estas «Lauda della Crocifissione» (Laŭdokanto pri la Krucumo), «Lauda della Passione» (Laŭdokanto pri la Pasiono) aŭ, laŭ la unua verso, «Donna de Paradiso».

Menciindas, ke al Jacopone estas atribuitaj ankaŭ multaj aliaj verkoj, inter kiuj la fama latinlingva «Stabat mater dolorosa» (Staris la patrino plore, ADORU n. 295 - 297), muzikigita interalie de Scarlatti, Vivaldi, Pergolesi, Rossini, Dvořák.

La verko havas kiel rolulojn la anonciston, la Madonon, sanktan Johanon la Evangeliiston kaj la popolon. Estas pritraktataj la kernaj momentoj de la Pasiono, kaj ĉefa atento estas rezervita al kruda priskribo de la krucumo.

Hodiaŭ povas ĝeni tia krudeco, ĉar la mondo akceptas pli volonte la ideon pri iu Dio malproksima, aŭ kiu, fariĝinte homo, ne suferis en plena maniero: tio ankaŭ ebligas, ke oni sentu sin malpli respondecaj pri la havigitaj turmentegoj.

La lingvo de la laŭdokanto estas arkaika, plena je regionaj terminoj kaj kripligoj, tiel ke nuntempa italo multe penas por kompreni ĝin, kaj nepre bezonas klarigajn piednotojn aŭ senpere tradukon en hodiaŭa lingvaĵo.

Des pli rimarkinda, do, estas la frukto de la traduko al Esperanto, unu el la plej brilaj inter la multaj faritaj de la roma esperantisto Enrico Dondi (1935-2011), – https://eo.wikipedia.org/wiki/Enrico_Dondi – kiu, jam ekde la frua junaĝo, elpaŝis per majstraj tradukoj el la itala poezio de ĉiuj jarcentoj: Precipe memorindaj estas lia versio en rimitaj tercinoj de la tuta «Dia Komedio» (eld. Fonto), tiu en poezio kaj prozo de la «Vivo nova» de Dante (eld. Fonto), tiu en rimitaj oktavoĵoj de la tuta «Jerusalemo liberigita» de Torquato Tasso (eld. Fonto). En la «Itala

antologio» (eld. Cooperativa editoriale Esperanto kaj Federazione Esperantista Italiana, Milano 1987) enestas liaj tradukoj ampleksantaj sep jarcentojn, el Cielo d'Alcamo, Jacopone da Todi («Ploro de la Madono», paĝoj 24 - 32), Dante Alighieri, Lorenzo il Magnifico, Angelo Poliziano, Ludovico Ariosto, Torquato Tasso, Gabriello Chiabrera, Francesco Redi, Pietro Metastasio, Ugo Foscolo, Alessandro Manzoni, Giovanni Prati, Giacomo Zanella, Giosuè Carducci.

Karakterizo de la traduk-arto de Enrico Dondi estas la absoluta fideleco al la originala teksto, kiu iras manenmane kun tuj komprenebla lingvaĵo, kun evito de artifikaj ĵonglaĵoj; samtempe, rimarkindas la kapablo redoni la spiriton de la originalo, kun plena respekto de la lingvaj malsimilaĵoj, kaj de la malsama media etoso tra la jarcentoj.

Sankta Sabato, 2016-06-26

Antonio De Salvo